

Eŭropa Bulteno

Novembro 2013, Numero 132

LA DEKA EŬROPA ESPERANTO-KONGRESO DE EEU EN RIJEKA



Preparoj por la deka jubilea kongreso de EEU en Rijeka tre bone evoluas. Sur la kongresa paĝaro (<http://eeu-kongreso.webnode.com>) ni aperigis la loĝeblecojn kaj la kostojn de la hoteloj. Baldaŭ eblos ankaŭ rete mendi la hotelojn. Mi atentigas la interesitojn ke la dua aliĝperiodo estas fino de decembro kaj ke ĉiuj kiuj volas ŝpari iom da sia mono decidu laŭeble baldaŭ aliĝi.

Ankaŭ la preparoj por la 4-taga antaŭkongreso estas baldaŭ finiĝontaj. Estos alloga antaŭkongreso en la meza parto de la kroata Adriatika bordo kun multaj interesaj ekskursoj al la plej atrakciaj naturbelaĵoj de Kroatio. Do, ne prokrastu la decidon pri aliĝo.

La redaktoro

RENKONTIĜO KUN JÁN FIGEĻ, VICPREZIDANTO DE LA NACIA KONSILIO (PARLAMENTO) DE SLOVAKIO

La 21-an de novembro 2013 Ján Figeľ, vicprezidanto de la Nacia Konsilio de Slovakio kaj eksa Komisionano de EU por Edukado, Kulturo kaj Multlingvismo akceptis en la Nacia Konsilio Jozef Reinvar el Ministerio de Eksterlandaj kaj Eŭropaj Aferoj kaj Peter Baláž, estron de la civitana asocio Edukado@Interreto kaj kunordiganton de pluraj multlingvaj interretaj projektoj financataj de la Eŭropa Komisiono.



La renkontiĝo estis daŭrigo de ilia interparolo komencita dum la 23-a Ekonomia Forumo en Krynica la 3-an de septembro 2013, kiam Ján Figeľ vizitis EEU standon, kie li vidis, ke Esperanto estas vivanta lingvo kaj interesiĝis pri novigaj projektoj evoluantaj interretan instruadon de unuopaj EU-lingvoj kaj samtempe vastan multlingvismon en EU post la jaro 2009, kiam li finis sian mandaton de EU komisionano.

Dum la renkontiĝo ni informis Ján Figeľ kaj lian konsilanton Darius Anton Hatok, ke dank'al Esperanto kaj al multlingva portalo por ĝia interreta instruado www.lernu.net, kiun preparis kaj kunordigas Edukado@Interreto ekde 2002 kiu nuntempe sukcese funkcias en 37 lingvoj, estis preparita portalo por multlingva intrerreta instruado de la slovaka lingvo kaj informado pri Slovakio: „Slovake.eu“ www.slovake.eu, kiun financis en periodo inter 2009 kaj 2011 Eŭropa Komisiono (lingva nivelo A1-A2 kaj nuntempe en 9 lingvoj). Peter Baláž plue informis, ke post ĝia 2-jara tre sukcesa funkciado Eŭropa Komisiono en julio 2013 aprobis kaj financos ĝian duan etapon de 2013 ĝis 2015. Plialtigita estos ĝia lingva nivelo je B1-B2, aldonitaj estos 3 lingvoj (la hungara, rusa kaj kroata) kaj pliaj informoj pri Slovakio. Li ankaŭ informis pri aktualaj statistikoj, ke la portalo estas utiligata en 190 landoj kaj la slovakon studas rete nuntempe pli ol 12 mil registritaj studentoj.

Jozef Reinvar informis lin pri planoj de la Ministerio de Eksterlandaj kaj Eŭropaj Aferoj kaj aliaj ministerioj uzi la modelan multlingvan interretan portalon dum la Prezidenteco de Slovakio en EU la 2-an duonjaron 2016 por informi la civitanojn de EU kaj de la mondo multlingve (eble en pli ol 20 lingvoj). Pri tio oni diskutas ekde la 9-a de majo 2013 en la Nacia Konvencio pri EU, tutsocia diskutplatformo, kiel plej efike utiligi tiun ĉi modernan komunikilon por informi civitanojn de la tuta mondo pri Slovakio, ĝia prezidenteco en EU kaj al motivitaj civitanoj studi la slovakon pere de multaj lingvoj, faciligi al ili ĝian studadon en propraj lingvoj.

Krome en la laborgrupo pri „Slovakia Prezidanteco en EU en 2016“ estis proponita (de 4 esperantistoj: Peter Baláž, Eva Poláková, Jozef Reinvar, Ján Vajs) temo por nacia prioritato de la Prezidanteco de Slovakio en EU „Evoluo de kultura dimensio en EU“. Enkadre de ĝi povus esti organizita konferenco pri lingvaj kaj kulturaj problemoj en EU, plibonigo de lingvo-instruado, subteno de ĉiuj lingvoj (vastan multlingvismon), preparo de strategio de instruado de infanoj, junuloj al fundamentaj eŭropaj valoroj, evoluo de eŭropa konscio de civitanoj kune kun samtempa konservado kaj respekto de ĉiuj identecoj de civitanoj.

Ni informis lin, ke Slovakio povus testi tiun ĉi politike tiklan temon dum sia Prezidanteco en Viŝegrada Grupo (tiel nomata V4 - Pollando, Hungario, Ĉeĥio kaj Slovakio), kiu okazos ekde julio 2014 ĝis junio 2015. Celo de la testado estus, ĉu EU landoj pretas diskuti ĉe komuna tablo lingvajn kaj kulturajn problemojn, kiuj endanĝerigas koĥerecon de EU kaj ĝian pluan demokratian kaj efikan funkciadon. Tiamaniere Slovakio volus prepariĝi por pli grandskala, tuteŭropa diskuto kiun partoprenus politikistoj, lingvistoj kaj reprezentantoj de civitanoj. Fine de la interparolo ni informis lin pri la iniciato de Pollando kaj kreo de la Parlamenta Grupo por Subteno de Esperanto, kiel nemateria kultura heredaĵo de Pollando, kiu estas samtempe kultura heredaĵo de EU kaj kiun estras Prof. Edmund Wittbrodt. Post listigo de Esperanto sur la liston de kulturaj heredaĵoj, Pollando povos proponi al EU utiligi tiun ĉi neutralan lingvon por egalrajtigo kaj efektivigo de interetna komunikado inter ĉiuj civitanoj, por ilia pli bona lingva kaj kultura interkompreniĝo kaj por ilia pli facila movebleco tra tuta EU/Eŭropo.

Ján Figel' estis surprizita pri atingitaj rezultoj en prezentado de Slovakio kaj efika instruado de la slovaka en la tuta mondo pere de la moderna, noviga kaj multlingva portalo „Slovake.eu“. Li promesis subteni ĝian utiligon dum la Prezidanteco de Slovakio en EU kaj same la proponitan temon „Evoluo de Kultura Dimensio en EU“, kiel nacian prioritaton de la Prezidanteco de Slovakio en EU. Li akcentis, ke oni ne povas diskuti nur pri ekonomiaj temoj, sed estas urĝe lanĉi tuteŭropan diskuton pri la kultura dimensio, kiu ĝis nun restis je nacia nivelo. Tiu ĉi dimensio rekte koncernas civitanojn kaj ilian pli bonan lingvan kaj kulturen interkompreniĝon kaj tiamaniere ekvilibrigi la eŭropan integriĝon.

Lia vido de Esperanto iomete ŝanĝiĝis al pli pozitiva post ekscio pri faktoj, ke Esperanto helpis al kreo de la multlingva portalo por la slovaka. Ni informis lin ankaŭ pri sukcesa propedeutika, lingvo-orientiga projekto „Lingvolanĉilo“ en elementaj lernejoj en Britio, en kiu estas utiligita gramatiko de Esperanto kaj 500 plej oftaj radikoj, kiuj kuraĝigas infanojn lerni fremdan lingvon kaj helpas akiri pli bonajn rezultojn en studado de fremdaj lingvoj. Li promesis, ke li parolos kun Prof. Wittbrodt, kiun li konas de ilia pasinta kunlaboro kadre de la Konsilio de Eŭropo, pri la parlamenta iniciato en Pollando. Estus bone se Prof. Wittbrodt povus diskuti persone kun Ján Figel', se ili renkontiĝus, kaj klarigi al li ĉefajn argumentojn por subteni Esperanton, ke li pli bone komprenu la polan parlamentan iniciaton, kiu havas fundamentan kaj ŝlosilan signifon por EU kaj plua eŭropa integriĝo.

Fine de nia interparolo Ján Figel' diris, ke li subtenas multlingvismon kaj estas kontraŭ uzado de unu lingvo. Ni poste jam ne havis temon por diskuti pri diferenco de la nuntempe domina uzado de la angla kaj ebla uzado de Esperanto, kiel komuna, neŭtrala kaj egalrajtiga komunikilo de ĉiuj civitanoj de EU.

Ni finis nian renkontiĝon per konstato, ke ni estos en kontakto kaj informados lin pri proponoj kaj evoluo de la lingvo-politikaj kaj kulturaj aferoj, kiujn li pretas subteni de sia nuna pozicio

de Vicprezidanto de la Parlamento malgraŭ tio, ke lia Kristana Demokrata Movado, agas nuntempe en la parlamento en opozicio.

Jozef Reinvarť kaj Peter Baláž,
membroj de la Nacia Konvencio pri EU en Slovakio

EAB NE VIDAS KIALOJN MEMBRI EN EEU

Ĉi-sube vi trovas kompletan korespondadon inter septembro kaj novembro inter mi kaj Esperanto-Asocio de Britio pri la demando de nepagado de kotizo al EEU. La legantoj mem tiru siajn konkludojn. Konsideru ke EAB nun estas la ununura Landa Esperanto-Organizo kiu ne membras en Eŭropa Esperanto-Unio.

La redaktoro

16-an de septembro 2013

Kara John! (Al John Wells)

Ĉar en julio 2014 okazos elekta kongreso de Eŭropa Esperanto-Unio en Rijeka (Kroatio), mi skribis peton al la listo de assembleanoj de EEU ke ili informu min, ĉu la assembleanoj ĝisnunaj restas la samaj ankaŭ en 2014 kiuj voĉdonos en Rijeka, aŭ estas iu ŝanĝo, ĉar la assembleanojn nomas landaj asocioj.

Ĝis nun en la listo troviĝanta sur nia paĝaro www.europo.eu enestas la brita assembleanino Helen Fantom.

Ian Fantom informis min, ke li demandis ŝin kaj ke ŝi respondis ke EAB ne estas membro de EEU, ne pagas la kotizon kaj sekve ne havas assembleanon.

Kompreneble, ke tian respondon mi ne povas konsideri oficiala, ĉar ne venis de organoj de EAB. Tial mi turnas min al vi kun demandoj:

1. Ĉu EAB per iu oficiala decido vere ekzistas el EEU? Se jes, kiam kaj far kiu organo?
2. Se ne, kiu estas oficiala membro de la Asembleo de EEU nome de Britio?
3. Se EAB volas ke tiu assembleano rajtu voĉdoni en Rijeka, ĝi devas pagi kotizon al EEU almenaŭ por la jaroj 2013 kaj 2014.

Dankon por la respondoj. Mi sendas kopion al nia prezidanto Sean O Riain

Zlatko Tišljar, sekretario de EEU



Mi ne plu estas la Prezidanto de EAB. Ĉi-jare estis elektita Paul Gubbins al tiu ofico. La sekretario de la Asocio estas Tim Owen. Mi kopias al ambaŭ ĉi tiun respondon.

Estas vere, ke por EAB parolas ties elektitaj oficuloj, kaj certe ne Ian Fantom. Estas vere ankaŭ, ke antaŭ pluraj jaroj EAB decidis ne plu membri en EEU, pro kialoj kiujn s-ro Tišljar bone scias.
John Wells

Estimata sinjoro Wells! (sendita ankaŭ al Paul Gubbins, Tim

Owen kaj la estraro de EEU)

Responde al via letero:

Vere nek mi nek Seán sukcesis kompreni tian konduton de EAB. Ĝis la jaro 2008 Britio pagadis ĉiujare 500 eŭrojn kiel jaran kotizon al EEU. Ankaŭ en 2009 estis pagitaj 500 eŭroj kaj mi opiniis ke temas pri la kotizo. Tamen, la tiama sekretario David Kelso subite anoncis

ke oni ne plu pagos kotizojn ĉar la 500 eŭroj ne estis kotizo sed pago por subteni la produkton de la filmo Eŭropo 2050, kiun ni estus devintaj sendi al EAB kaj li (sekretario) ĝin ne ricevis. Mi sendis la duan fojon la DVD-on, kaj li denove asertis ke li ne ricevis. La trian fojon Seán sendis DVD el Bruselo kaj ankaŭ tiam li asertis ne ricevi ĝin. Fine ni montris ke la filmo estis produktita kaj oni povas spekti ĝin en la reto.

Sed EAB ne plu pagadis la kotizon. Malgraŭ la klara fakto ke la tiama sekretario kun la subteno de la tiama prezidanto eluzis la aferon pri la filmo kiel pretekston por interrompi rilatojn kun EEU, neniu en la estraro de EEU ankoraŭ komprenas, kiuj estis la veraj motivoj por tio. Krome, EEU neniam ricevis oficialan leteron de iu el la oficialuloj de EAB kiuj klare dirus ke la estraro de EAB aŭ la Asembleo decidis eliri el EEU.

Ni insiste petas al la nuna prezidanto de EAB respondi al miaj tri demandoj:

1. Ĉu EAB vere decidis eliri el EEU?
2. Se jes, kiu organo kaj kiam tion decidis kaj pro kiu kialo?
3. Se ne, mi petas ke EAB delegu ĝis la jarfino sian asembleanon en la asembleon de EEU.

Amike

Zlatko Tišljarić



Paul Gubbins

Estimata,

mi ricevis komunikaĵojn senditajn al John Wells pri EAB kaj EEU. Bv. estontece direkti ĉiujn tiajn komunikaĵojn nur al mi, prezidanto de EAB, kaj al Tim Owen, sekretario de EAB. Nek John, prezidanto de EAB, nek ekzemple Helen Fantom, ludas oficialan rolon en la administrado de EAB.

Malgraŭ tio, ke vi "insiste petas", ke mi respondu al viaj demandoj, vi komprenos - mi esperas - ke mi ne povas tuj reagi. Nepras, ke mi prie esploru kaj eventuale kunsidu kun kolegoj en la estraro de EAB.

Sincere,

d-ro Paul Gubbins

Prezidanto de EAB

Helen Fantom

Kion ajn decidis la Brita Asocio, mi konfirmas, ke mi antaŭ kelkaj jaroj ĉesis esti reprezentanto de EAB ĉe EEU, kaj ne ree estos asembleano.

Mi persone bondeziras al la agado de amba asocioj.

Kore salutas

Heleno

Tiŝljarić al Gubbins

Dankon por la respondo. Mi ja skribis en la unua letero al la Asembleo de EEU ke ni bezonas la informojn ĝis la jarfino, do estas tempo.

27-an de oktobro 2013

Estimata s-ro Tiŝljarić,

la komitato de Esperanto-Asocio de Britio diskutis dum sia lasta kunsido vian demandon pri brita aliĝo al EEU.

Komitatanoj ne vidas kialojn por aliĝi al EEU, agnoskante, ke nepras prioritare dediĉi financajn kaj aliajn rimedojn de la asocio al la enlanda, ne eksterlanda, movado.

Nome de EAB, mi do petas, ke vi ne plu konsideru Esperantan Asocion de Britio en rilatoj kun EEU.

Evidente la asocio pretas en siaj informiloj reklami konferencojn de EEU, por ke individuaj membroj decidu, ĉu ĉeesti (kio okazis ekzemple en Galivo).

Sincere,

Paul Gubbins

Prezidanto de EAB

POLA PROPONO PROKLAMI ESPERANTON NACIA KULTURHEREDAĴO DE POLLANDO TRANSDONITA



La propono proklami Esperanton Nacia kulturheredaĵo de Pollando estas transdonita al Nacia Instituto pri la Kultura Heredaĵo (pole: Narodowy Instytut Dziedzictwa (NID)) Membroj de la Pola EDE (Europo-Demokratio-Esperanto) post kelkmonata laborego ligita kun plenumado de la historia propon-formularo destinita al la Nacia Instituto de Heredaĵo en Pollando kaj koncernanta ĝian enskribon sur la landan liston de Nemateria Kultura Heredaĵo, finis sian laboron.

Post kelkmonataj interkonsultiĝoj kun mag. Bartosz Skaldawski - la Direktoro de NID kaj kun prof. d-ro habil. Edmund Wittbrodt - la Senatano de Respubliko Pollando kun la celo kompletigi necesajn priesperantajn informojn por la enketa Propon-formularo destinita al la Instituto, la 13-an de novembro nia EDE-ano Kazimierz Krzyżak transsendis per la rekomendita poŝto la skribajn dokumentojn necesajn: 1.

propon-fomularon, 2. liston de 47 instituciaj apogletoj (parlamentanoj, MEP, distriktestroj, urbestroj, direktoroj de muzeoj, Zamenhof-Lernejoj ktp.), 3. 1624 individuaj deklaroj apogantaj la ideon de la Propono.

Post konfirmo pri ricevo de la poŝtaĵo, flanke de direktoro de la Instituto, ni atendas lian informon pri tempo de procedado far la Kapitulo (NID-Komisiono) kaj pri ĝia komenca opinio.

Kiel ni jam informis, eventuala aprobo de la propon-formularo far la Kapitulo estus la unua sukcesa paŝo, antaŭ la sekvaj, ligitaj kun agnosko de Esperanto en Eŭropo kaj en la Mondo. Se la pola 'vojo' montriĝos trafa kaj efika, tiam aliaj EDE-filioj povos ĝin sekvi kadre de la EDE-Federacio.

Jerzy Antoni Walaszek

KVARA KUNSIDO DE LA TEAMO PRI LA EŬROPA PROJEKTO LINGVO.INFO



La kunsido de ĉiuj ok partneroj okazis en Ljubljana (Slovenio) de la 2-a ĝis la 4-a de novembro. Kiel konate la projekto estas financata de la Programo por tutviva lernado, subprogram KA 2 por lingvoj kaj kunordiga partnero estas Eŭropa Esperanto-Unio. Ĉi-foje la loka

kunvenorganizanto estis partnero el Slovenio: Asocio por Eŭropa Konscio. La kunvenoj okazis la 3-an kaj la 4-an de novembro en City-hotelo de Ljubljana. Oni diskutis intense pri la lastaj raportoj necesaj por meza raporto post duono de la projekto, pri la stato de la tri partoj de la projekto (Lingvopedia, Babilono kaj Lingva ludo). Lingvopedia ampleksas priskribon de pli ol 20 eŭropaj lingvoj laŭ certa formularo en maniero ne komplika, alloga por iu ajn intereso, tamen science korekta. Ĝi estas praktike finita, krom kelkaj aldonaj lingvoj, kiujn oni ŝatus havi, kvankam ne estas la tasko de la projekto. Tiusence ni serĉas ankoraŭ iun kiu farus tion por la islanda, malta kaj rumana lingvoj kaj eventuale pri iuj regionaj lingvoj en Eŭropo.

Babilono estas parto kiu klarigas ligvojn kiel fenomenojn el diversaj anguloj kiel lingvistika, geografia, popolnombada ktp. Tiu parto estas en la komenco de sia ellaboro, sed ĝi ankaŭ devus esti finita ĝis la fino de la jaro. La tria parto estas lingva ludo kiu devus allogi ĉefe gejunulojn por okupiĝi pri lingvoj. Oni pridiskutis diversajn ideojn kion enmeti en la ludon kaj kiel prezenti en ĝi universale lingvojn en maniero ke povu ludi ĝin kiu ajn en la mondo.

La projekto devas komplete produkti paĝaron kun ĉiuj tri partoj ĝis fino de novembro 2014 kaj intertempe okazos tri pliaj kunvenoj de partneroj, unu en Litovio, unu en Danio kaj unu en Kroatio.

Intertempe la teamo preparis ankaŭ logotipon de la projekto kaj povis produkti unuajn informilojn. EEU jam presigis dulingvajn informilojn: unuflanke en la angla, aliflanke en Esperanto. Tiel ili povas servi kaj por ĝenerala informado, ĉefe inter aliaj eŭroponovellaj organizoj, kaj por esperantistoj. Samtempe ankaŭ la neesperanta publiko ricevas ankaŭ la aliflankan esperantan tekston kaj povas sperti kiel aspektas esperanta teksto, provi ĝin legi kaj kompreni.

lĩngvø.ĩnfo

Zlatko Tišljar

SIN KOMPRENOS POR SIN RESPEKTI LA PARTOPRENANTOJ DE LA ITALA KONGRESO

Matene, la 4-an de aŭgusto komenciĝis la 80-a Itala kongreso. Ĝi okazis en la nord-okcidenta parto de la lando, apud San Remo, en la vilaĝo Kastelaro. La kongresanoj loĝis en bonaj kondiĉoj de la turisma golf-tereno de Kastelaro. La kongreson partoprenis 220 personoj el 34 landoj. Post la partopreno de UK oni povis senti sin kvazaŭ en iu postkongresa aranĝo, ja revideblis plurdekoj da homoj, ĉeestintoj ankaŭ en Islando. La malferman programon ĉeestis kaj la partoprenantojn salutis pluraj reprezentantoj de la gastiganta urbo kaj regiono. Pri la kongreso raportis pluraj naciaj kaj lokaj amaskomunikiloj.

Kvankam la kongreso okazis en turisme grava kaj belega regiono kaj estis organizataj multaj interesaj ekskursoj kaj programoj, dum la semajno disvolviĝis kursoj, altnivelaj seminarioj kaj klerigaj programoj. La kongreso ofertis lingvajn kursojn je tri niveloj. Ĉeestis ankaŭ Humphrey Tonkin, kiu prelegis plurfoje pri kulturaj kaj lingvopolitikaj temoj kaj gvidis publikan debaton pri la multflankeco de la eŭropa kunvivado.

Okazis tri seminarioj: *Paul Gubbins* el Britio gvidis programon pri la "*Eŭropa kulturo tra Esperanto*", *Maria Nuyanzina* el Rusio klerigis pri "*Historio kaj praktiko de tradukado*". *Katalin Kováts* (HU/NL) kun la asisto de *Sylvain Lelarge* (FR/NL) gvidis 50-horan metodikan seminarion, kiun frekventis 7 personoj, el kiuj tri estis financataj pere de eŭropunia stipendio.

La artan flankon de la kongreso konsistigis tri teatraĵoj (Saŝa Pilipoviĉ, Georgo Handzlik kaj Christoph Frank), pluraj koncertoj (de Kim, Kapriolo, Manuel Rovere, Gijono Armide, Georgo Handzlik), ekspozicio de pentraĵoj de ĉina artisto Ho Song.

La ĉeestantaj junuloj havis apartan, riĉan programaron, ĉefe noktajn aktivadojn sub la gvido de Boris Mandirola. La junuloj, ne maturaj ankoraŭ por noktumado, havis apartan prizorganton kun aktivadoj. La libroservo preskaŭ kontinue tentis nin en la ĉefkoridoro. Italaj manĝaĵoj, varmega vetero ekstere kaj freŝiga temperaturo ene de la ejoj instigis al realigo de la kongresa devizo, teorie kaj praktike "*Sin kompreni por sin respekti.*"



KONKURSO PRI PRIESPĜRANTA INFORMADO ĈĜE FONDAĜO CIGNO

Kiel vi jam estas informitaj pere de la Esperanto-gazetaro, la venkinto pro la ekstera informa agado en la jaro 2012 estas Esperanto-Asocio en Ĉeĥio. Detalojn pri ilia agado vi povas trovi en la Facebook-paĝo de la Fondaĝo, kiun ni varme invitas vin viziti kaj laŭeble klaki ĉe la butono 'ŝati'. La premion transdonis kadre de la Universala-Kongreso okazinta en Rejkjaviko (Islando), nia estraranino, s-ino Barbara Pietrzak, al reprezentanto de la Ĉeĥa Esperanto-Asocio.

Ĉi-foje mi deziras inviti Landajn Asociojn en EU partopreni en la sekva konkurso, kiam la premio estos aljuĝita pro la informa agado farita inter la 1-a de januaro kaj la 31-a de decembro 2013. Bonvolu, do, sendi al la adreso sube indikita raporton pri la agado de via Landa Asocio kune kun kopioj de la gazetaraj informoj, son- kaj filmdosieroj ĝis plej malfrue la 31an de januaro 2013. Pri la rezulto estos rekte informita la gajnanto kaj ĝi estos diskonigita pere de la E-gazetaro la 15-an de marto 2013. La premio konsistos el mono (la egalvaloron de JPY 200,000), diplomo kaj japana suveniro.

Kun bondeziroj pri sukcesa informa agado salutas,
Ayako Kawakita,
Prezidanino de Fondaĝo 'Cigno'
Konkursaĝojn sendu al: Swany Corp.
981 Matsubara, Higashikagawa 769-2795, Japanio
cigno2012@gmail.com

TAGO DE EŬROPAJ LINGVOJ EN SVEDIO

Ekde almenaŭ 2006 la Sveda Esperanto-Federacio (SEF) ĉiujare iamaniere partoprenis publikajn eventojn pri la Eŭropa Lingvo-tago la 26-an de septembro en Stokholmo. Ekde 2010 la Eŭropa-Domo (la oficejo de la Eŭropa Komisiono en Svedio) gastigis la eventon, kiu dum la lastaj jaroj havis la formon de "lingvo-kafejo", kunorganizita de ambasadoj, lingvaj kaj kulturaj institutoj.



Lernejoj en Stokholmo estis invititaj kaj centoj da junaj gelernantoj de 13- ĝis 18-jaraĝaj vizitis la "kafejon" dum la tago por "gustumi" diversajn lingvojn – do, inter ili Esperanton. En la kafejo troviĝis kvizo pri la proksimume 15 partoprenintaj lingvoj, kaj la lernantoj, kiuj korekte respondis la demandojn, ricevis premiojn. Inter la premioj ĉi-jare troviĝis du ekzempleroj de "Esperanto Direkt" – la svedlingva versio de "Esperanto per rekta metodo". Ĉe la Esperanto-tablo, kie deĝoris Olof Pettersson (vicprezidanto de SEF) kaj komencantkursanino Solvejg van der Kroon, tiuj kiuj montris intereson pri Esperanto post prov-leciono – kaj gelernantoj kaj instruistoj – ricevis "La Ŝlosilon" (svedlingvan), Esperanto-poŝtkartojn kaj legosignojn.

Olof Pettersson

MORTIS RÜDIGER SACHS



La 21-an de novembro forpasis en la aĝo de 86 jaroj Rüdiger Sachs, multjara prezidanto de ISAE kaj redaktoro de Scienca Revuo, kiujn li "heredigis" al juna, aktiva teamo kiu nuntempe daŭrigas lian sindonan laboron. Sinjoro Sachs estis doktoro pri veterino kaj multjare laboris en Afriko specialiĝinte pri afrikaj bestmalsanoj. Li estis longjara membro de Internacia Akademio de Sciencoj San Marino kaj de diversaj fakaj asocioj. Li organizis en 2006

simpozion okaze de 100-jariĝo de ISAE en itala urbeto Tavolero proksima al San Marino. Li estis tre humanisma esperantisto kun grandega laborenergio kaj dank al li oni plu havas Scienca Revuon kiun li aperigadis ankaŭ en la plej malfacilaj tempoj dum lastaj dudeko da jaroj.

Pli pri li en vikipedio: http://eo.wikipedia.org/wiki/R%C3%BCdiger_Sachs

Lia filino Martina skribis: Mia patro trankvile forpasis post mallonga sed grava malsano la 21-an de novembro. La funebra ceremonio por adiaŭi lin solene okazos la 6-an de decembro en Eschwege. Dum siaj lastaj tagoj ni ankoraŭ ĝuis en familia rondo lian humoron kaj belajn historietojn. Li realigis prekaŭ ĉiujn siajn revojn dum la vivo de 86 jaroj, inkluzive de la vojaĝo islanden.

Zlatko Tišljarić

STATO DE E-INSTRUADO EN LA UNIVERSITATOJ

Jen estas la nova situacio, ĝis nun (3-a de novembro 2013):

Oficialaj E-kursoj en universitatoj kaj altinstitutoj (15 en 11 landoj):

- Aŭstrio / Innsbruck
- Ĉeĥio / Brno
- Ĉinio / Baotou
- Germanio / Emden - Münster
- Hungario / Nyiregyháza
- Italio / Torino
- Japanio / Minoo
- Korea Resp. / Iksan – Jukjeon/Chonan – Seoul/Yongin – Seoul/Suwon
- Kroatio / Zagreb
- Nikaragvo / Managua
- Usono / Stanford

E-kursoj kadre de universitata asocio (2 en 1 lando):

- Britio / Liverpool - Sheffield

Sinjoro Pirlot petas tiujn kiuj ne ankoraŭ informis pri la nuna stato kaj eventualaj ŝanĝoj, fari tion ĝis la 7-a de decembro.

Pirlot Germain

ETSUO MIYOSHI RICEVIS LA ORDENON DE LA LEVIĜANTA SUNO



La 12-an de novembro en la Imperiestra Palaco en Tokio la japana esperantisto kaj mecenato de Esperanto, Etsuo Miyoshi, ricevis la Ordenon de la Leviĝanta Suno. Ĝi estis donita al li pro la kreo de la bastonvalizo Walkin'Bag, kiu helpas handikapulojn por moviĝi ien ajn dum komercado, promenado, vojaĝoj, eĉ hejme.

Etsuo Miyoshi mem rakontis pri la evento:

"Ĉirkaŭ mil ordenricevantoj estis en la granda halo. La Imperiestro gratulparolis. Poste, li promene sin direktis rekte al mi. En mia koro regis konfuzo. Mi ne komprenis, kio okazis. Li afable demandis pri mia sano, mi dankis pro lia komplezo, kaj li kliniĝis. Poste la Imperiestro ĉirkaŭiris, salutante ĉiujn.«

Post mia naskiĝo mi kaptis poliomyeliton. Infanoj primokis min, amikinoj foriris de mi, malfacilis al mi promeni, kaj nun mi batalas kontraŭ postpoliomyelito. Tiaj premoj trejnigis min persisti en la kreado, surmerkato kaj manaĝerado de ĉio ajn. Tiel mi povis transiri Rubikonon.

Retrorigardante mian vivon, mi konstatas, ke Dio benis min. Mia malsano utilis por helpi aliajn suferantojn kaj krei paradizon. Koran dankon pro via subteno kaj komprenemo por mia agado en Oomoto, Esperantujo kaj komercado".

el "La Balta Ondo"

Oficiala organo de Eŭropa Esperanto-Unio.

Finredaktita: la 4-an de decembro 2013

Redaktoro: Zlatko Tišljár

En la numero kunlaboris: Jozef Reinvart, Peter Baláz, Zlatko Tišljár, Jerzy Antoni Walaszek, Katalin Kovats, Ayako Kawakita, Olof Pettersson, Germain Pirlot, "La Balta Ondo".

Kontakto: ztisljar@gmail.com

Retpaĝo: <http://www.europo.eu/eo/europa-bulteno>

